



Tradicio estas unu el la fortoj, kiuj faras, ke lingvo restas komprenebla tra la jardekoj kaj ne estas subite kaj definitive submetita al pasanta vento de modo.

Tuj sprituloj atakas tiun tradicion, tiel ke eĉ Fundamentajn vortojn ili ne domaĝas. Ekzemple, iu sinjorino, kiu akuzas la aliajn konsideri nian lingvon, kiel ludilon, ne hezitis ignori la Fundamentan vorton "cirkulero", kaj do ŝi enkondukis la anstataŭan neologismon "cirkulaĵo", kiu same bone povus nomi aŭton cirkulantan sur vojo, aŭ sangoĉeleton portatan de la sanga cirkulado.

Oni bone komprenu, ke ne sufiĉas krei vortformon. Necesas ankaŭ doni al ĝi signifon. Oni ankaŭ komprenu, ke kun iom da imago eblas ŝanĝi kiun ajn vorton, kiun donis al ni la tradicio kaj Zamenhof. Antaŭ kelkaj semajnoj juna Esperantisto, kiu verŝajne ĵus legis laŭmodan verkon, tuj volis ekzerci sian freŝan scion kaj entuziasme deklaris al mi: "Jen! ni ne plu bezonas la vorton "rado", mi trovis, ke la saman ideon ni povas esprimi per "veturrondo!".

Fakte, li ankaŭ estus povinta proponi: "irrondo, irilo" aŭ eĉ "veturilo" aŭ "rondaĵo"! Sed mi ne scias, ĉu li estus komprenata?

Vere, mi diras, ke ankoraŭ longe ni bezonos konsideri la Fundamenton, kiel netuŝeblan. Zamenhof kreis ĝin konscie por ke ĝi estu la kerno de nia stabiliĝanta lingvo. Sed pasos ankoraŭ longaj jaroj antaŭ ol nia tradicio sorbinte la tutan Fundamenton, estos per si mem sufiĉe forta, por ke ni povu senpune forgesi tiun monumentan kaj eventan verkon de Zamenhof.

D-ro André ALBAULT

N.d.l.R.

"Cirkulaĵo!... veturrondo!..." Jen proponoj, kiuj ja memorigos al pluraj legantoj la sistemon de "Ĵak Pomfrit", pri kiu jam parolis Raymond Schwartz antaŭ pluraj jardekoj:

"Por sin movigi la homo posedas du ir-stangojn, kiuj aspektas kiel natura plilongigo de la sidkarno... La ekstremaĵo de la ir-stango nomiĝas ŝukarno, tiel nomita, ĉar estas ĝi, kiu plenigas la ŝuon..."

Kaj konkludis R.Schwartz: "Ĉu necesas diri, ke la sistemo de Ĵak Pomfrit neniel konvinkis min?"

("Simpligita Anatomio" en "La Ĝoja Podio" de R.S.- J.T.)



OPINIO DE LINGVISTO

"Estas ja utile - por kompreni la "fenomenon Esperanton" - provi kompreni ĝian originon kaj analizi la konduton de la esperantistoj. Ĉi-rilate estas klare, ke la ideo de universala lingvo, kiun ĉiuj lernus kiel duan lingvon, ekiras el noblecaj kaj respektindaj principoj, kiel estas klare, ke la "batalantoj" de Esperantismo defendas nenian personan intereson, kio ne estas la kazo en ĉiuj ide-movadoj...

"Sed la vera demando estas alispeca, ĝi estas - scii, ĉu, kion instruas al ni studo pri la historio de la lingvoj, tio igas verŝajna la sukceson de la projekto Esperanto, - aŭ alivorte analizi ĉi tiun projekton el socialingvistika vidpunkto.

"1) Ni vidis tra ĉi tiu libro (kaj aparte en la 8-a ĉapitro) ke la disvastiĝado de lingvo tra la spaco kaj tempo ĉiam estas la manifestiĝo de alia disvastiĝado milita, ekonomia, religia, kultura, ktp, ke ĝi atestas socian movadon pli profundan. Nu oni povas ĉe tio demandi, de kiu profunda socia movado Esperanto (aŭ ĉia alia arta lingvo) estus la manifestiĝo? mi skribis en enkonduko, ke la historio de la lingvoj konsistigas la lingvan flankon de la historio de la socioj, kaj iu vastiĝanta lingvo estas la lingvo-indico, ke vastiĝas homgrupo, precize la parolantoj de ĉi tiu lingvo. Sed la Esperantoparolanta komunumo kiel grupo de parolantoj starigas teorian problemon, ĉar ĝi konsistigas diasporon, displitan komunumon. Nu ni ne havas ian historian ekzemplon de lingva diasporo sukcesinta altrudi sian lingvon. La sola ekzemplo, kiun oni povus aludi, estas tiu de la hebre-lingva resurekto, sed necesis tiucele la kreado de Izraelo kaj oni povas demandi sin, ĉu origine senteritoria lingvo estas vivipova.

"2) Sur teoria plano do la esperantista projekto ŝajnas jam nerealegebla, aŭ almenaŭ respondas al nenio konata, sed tio ĉi ne sufiĉas por elkonkursigi ĝin. Pli gravaj por ĝi tamen estas la rezultoj de ĉiuj faritaj studoj pri la maniero, laŭ kiu homkomunumoj regis plurlingvismon. Mi multfoje kontraŭstarigis du tipojn de alproksimiĝo al tiu problemo, unu "in vivo"* surkampe kaj la alia "in vitro"* en laboratorio.

Nu estas klare, ke Esperanto devenas de la dua alproksimiĝo kaj ke ĉiufoje kiam stariĝas komunikadoproblemo, ne al Esperanto la socia praktiko sin turnas por serĉi solvon. Ni vidis en la dua parto de ĉi tiu libro, kiel disvastiĝadis la vehiklaj lingvoj, kiel surbazare oni sukcesis komunikadi malgraŭ plurlingvismo, kaj kiel ĉi tiu praktiko de komerca interŝanĝado eble antaŭ prezentis la lingvan situacion morgaŭan, ĉar merkato rivelas la grandajn vehiklajn movadojn.

" De ĉio ĉi Esperanto forestas, kaj tio estas normala: ĝi devenas de alia logiko. Sed la socialingvistika analizo senpasie pri la situacio povas nur konduki al unu konkludo: pacifisma solvo, idealista pri la milito de la lingvoj ŝajnas malmulte probabla. Ĝin bedaŭri oni povas, sed la personaj sentoj nenion povas fari pri tio, kaj la figuro de Zamenhof reiras al tiu de Jean Jaurès, nelacigebla batalanto de la paco ĉerande de la milito 1914-1918".

Jen pri Esperanto ĉi-supre tia estas la konkludo de franca lingvisto, Louis-Jean Calvet, en libro titolita "La interlingva milito kaj la prilingvaj politikoj" kaj eldonita en 1987 de Payot, fame konata pariza librejo pro siaj sciencaj verkoj.

* "in vivo": en la vivo / "in vitro": en vitraĵoj de laboratorio/ latinaĵoj.

Rekoni, ke la unua impresio ricevita ĉe tia legado vere ne estas favore pozitiva por la Lingvo, jen kio ne estas nura eufemismo!

Jam de longe Esperanto perdis la subtenon, kiun ĝi akiris ĉe la lingvistoj antaŭ la Unua Mondmilito kaj bedaŭrinde ne konservis post la Dua Mondmilito. Kaj tamen estus opòrtune rehavigi ĝin, ĉar estas fakto, ke la opinio de la ĝenerala publiko lasas sin influu interalie de la sciencistaj deklaroj, same kiel ĉiuj deklaroj mem pri Esperanto de la esperantistaj kondutoj.

Ja de la XVI-a j.c. estas klare (por eĥi stileron ŝatatan de L.J.-Calvet), ke la ŝtatoj pli kaj pli estigis kaj aplikis politikojn, kiujn ili nomis "kulturaj" se ne "lingvaj": ekzemple la edikto de Francisko la I-a en Villers-Cotterets, altrudante en ĉiuj oficialaj publikaj aktoj la uzon de la "oil"-lingvo anstataŭ la latina, certigis la superecon de tiu lingvo kontraŭ pluraj aliaj en Francio; kaj ĵus en Alĝerio nova leĝo altrudas la ekskluzivan uzon de la araba lingvo kontraŭ ne nur la franca sed ankaŭ la berbera! Kio montras, ke la esprimo "lingvo-milito" ne estas vana vorto!

Nu, dum furoras la lingvo-milito, kio estas konstatebla ĉe la gesamideanoj? Unu grupeto obstinas en iu verbotempismo, aliaj argumentadas pri la prefero por "komputilo" aŭ "komputero", por "komputaro" aŭ "komputoro", ankaŭ kelkaj pri tiu aŭ alia landnomo, kaj pluraj eĉ batalas kontraŭ laŭdiraj francaĵoj, latinaĵoj kaj grekaĵoj... asertante ekzemple, ke "n^o" anstataŭ "n-ro" estas francaĵo!

Por diskonigi la lingvon ekster Esperantio, pli pozitivaj estas ĝuste libroj, kiel tiu de P.Janton en la kolekto "Kion mi scias"*, la doktoriga tezo de F.Lo Jacomo en "La Sorbonne"2), aŭ instruaj metodoj kiel "Teach yourself" en Londono, "Assimil" en Parizo, ĉar ĉi tiuj libroj estas aĉeteblaj en iu ajn librejo kaj montras al neesperantistoj la lingvon vivan ekster senĉesaj kaj sencelaj disputoj pri la anĝela sekso aŭ kiel skribis Voltaire pri la plezuro "pesi muŝovojn en araneaĵoj"...

Sed ĝuste pro tiuj disputadoj, kiuj senĉese akriĝas jam de 1970, daŭre staras la demandoj (ĉ)): - kiel redoni al neesperantistoj konsideron pri la lingvo? - kaj kiel konvinki lingviston pri la jena malĝusta rezonado: ĉar Esperanto ne estas la manifestiĝo de socia disvastiĝado surbaze de "invado", "dolaro" aŭ "supernaturaj rilatoj", ĝi havas malmulte da ŝanco enkondukiĝi en la socion. Cetere ĉi tiu rezono retroviĝas en "ENCYCLOPEDIA UNIVERSALIS", en kiu sur la paĝo 646, ĉefine estas legeble: "Ne estas unu ekzemplo de lingvo, kiu ne estis en la komenco portata de politika komunumo, antaŭ ol esti pro kulturaj kaj religiaj kaŭzoj (la latina kaj la katolikismo) aŭ pro kaŭzoj de ekonomia aŭ politika superregado (la angla jam de cent kvindek jaroj) etenditaj al aliaj komunumoj. Oni nepre konstatas, ke Esperanto proponas sin surbaze de spirita komunumo sen politika-ekonomia grundo. Oni povas dubi pri la sukceso de tia entrepreno."
J.T.

*) "Que sais)je?" P.U.F. Paris. 2) Pariza Universitato. (ĉ) Preferinde la respondoj estu faritaj por ĉiaj utilaj celoj kaj en Esperanto kaj en etna lingvo./ * servoj, kiel la Traduk-Servo de June kaj Peter Miles en Londono, IO6 Baker Street (W 1M 1 LA).



« KECALO/KVEZALO : KIEL DECIDI, KIU VORTFORMO ESTAS ĜUSTA ? »

Kontrolo de la ĝusteco de vortoj

Unu el la taskoj de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro de la Akademio de Esperanto estas kontroli la lingvouzon en publikigaĵoj kaj atentigi pri eraraj formoj de vortoj kaj malĝustaj signifoj. En antaŭe publikigita artikolo en La Letero de l' Akademio de Esperanto (1) mi pritraktis la eraran difinon de "sgrafito" en glosaro de neologismoj. En la nuna verko mi prezentos ekzemplon de malĝusta vortformo, registrita en la plej prestiĝa leksikografia verko en Esperanto, Plena Ilustrita Vortaro (Suplemento) (PIVS), eldonita en 1987.

Temas pri la nomo de birdo, "kecalo", kiu en PIVS estas malrekomendita favore al la formo "kvezalo" sen iu ajn lingvistika pravigo!

La erara uzo de "kvezalo" komencas disvastiĝi.

La unuan indikon de disvastiĝo de la malĝusta formo "kvezalo" mi malkovris en artikolo de B. Wennergren, pritraktanta vortojn en Esperanto enhavantajn la konsonant-grupiĝojn "kv" kaj "gv" (2).

La vorto "kvezalo" aperas en listo de neoficialaj nezamenhofaj vortoj. Wennergren senpripense inkludis "kvezalo" (kaj ankaŭ duan malĝustan vortformon "pulkvo"), supozante, ke analogio kun aliaj kvo-vortoj en Esperanto pravigas la uzon de "kv". Ĉi-sube mi montros, ke li eraris pro nescio de la hispana lingvo kaj preteratento de jam esperantigitaj vortoj kaj nomoj sen "kv".

Leksikografia esploro.

En PIV (1970) la kapvorto "kecalo" estas difinita jene:

"Birdo el la ordo de apusoformaj birdoj, el Suda kaj Meza Ameriko, kun brilkolora plumaro kaj longegaj vostplumoj (Pharomacrus): en la blazono de Gvatemalo estas bildo de kecalo."

La vortformo "kecalo" troviĝas ankaŭ en la sekvaj vortaroj:

1. Grand Dictionnaire Espéranto-Français (G. Waringhien, 1957).
2. Esperanto-Bulgara Vortaro ((Sarafov kaj aliaj, 1963).
3. Lexicón Sopena (Paluzie-Borrell, 1967).

Cetere, ĉe la landnomo "Gvatemalo" en Poŝatlaso de la Mondo (1971) kaj en La Jaro- Praktika Poŝkalendario, eldonita ĉiujare de Monato, estas informo, ke la monunuo de la koncerna lando havas la nomon "kecalo". Malgraŭ tiuj precedentoj, PIVS (1987) ĉe la kapvorto "kecalo" sur pĝ. 24 resendas al "kvezalo" kun la sola rimarko "Vd pl.X, fig.16". Tie estas uzata la formo "kvezalo". Pluegante en PIVS oni trovas sur pĝ.27 registraĵon de la "ĝustigita" formo "kvezalo" kun jena klarigo: "Vd. difinon sub kecalo (en PIV).

Kio estas la kaŭzo de tiu konfuzo? Kiu el la du formoj, "kecalo/ kvezalo" estas la ĝusta en Esperanto? Ĉu estas eble decidi, ne arbitre, sed per apliko de reguloj por la similado de etnolingvaj etimoj en Esperanto? Eĉ se aktuale ne ekzistas kompletaj regularoj por ĉiuj lingvoj, kiuj kontribuis kaj kontribuos al la leksiko de Esperanto, utilaj gvidlinioj estas starigeblaj unuflanke kun helpo de analogio, aliflanke surbaze de detalaj principoj formulitaj por kelkaj etnaj lingvoj. Unu el la regularoj temas specife pri vortoj kaj nomoj hispanlingvaj (3). Mi uzos ambaŭ metodojn por

pruvi objektivaj, ke nur "kecalo" estas la ĝusta formo de la bird-nomo en Esperanto.

La etimologio kaj prononco de la hispana etimo quetzal

La etimo de "kecalo" estas la hispana vorto quetzal, kiu devenas de quetzalli; en la nahuatla lingvo de Mezameriko ĝi signifas multvaloran plumon. La hispanamerika prononco de quetzal estas / keCAL/ kun akcento sur la lasta silabo. Asimilado de tiu vorto tute ne prezentas problemon; oni simple skribas la sonojn per literoj de la Esperanta alfabeto kaj aldonas la substantivan finaĵon "o". La akcento de la radiko estas sur la sama silabo kiel en la etimo. En la sekvaj du sekcioj mi prezentos detalan pravigon.

Regulo 1: hispana que devas esti transskribita kiel "ke" en Esperanto

Mi citas el § 6.2.4. el mia studaĵo menciita en noto 1. Temas pri la senvoĉa ploziva velara fonemo / k /. En la hispana lingvo tiu fonemo havas du grafiojn: c antaŭ la vokaloj a, o, kaj u kaj la konsonantoj l kaj r; antaŭ la vokaloj e aŭ i la literoj qu estas uzataj. La ekvivalento en Esperanto estas "k": cacao-kakao, Colombia-Kolombio, escudo-eskudo, chicle-ciklo, Sukre-Sukro. (...) La prononco de que kaj qui ilustras la sekvaj vortoj: vaquero-vakero, mosquito-moskito. (...) en tiun ĉi litergrupigon estas en-trudita la sono "v" pro nescio, ke la u estas muta (...). Komparu la traktadon de la sekvaj propraj nomoj kaj vortoj.

<u>Hispanaj etimoj</u>	<u>Esperantigoj</u>	
<u>Torquemada</u>	Torkvemado	Gaston Waringhien (1957)
	Torkemado	PIV (1970)
<u>pulque</u>	pulkvo	G.Waringhien (1957); PIV (pĝ.886).
	pulko	PIV (pĝ.15 en artikolo pri "agavo"). RIM. La ĝusta esperantigo estas "pulkeo".
<u>Quezon City</u>	Kvezono	<u>Poŝatlaso de la Mondo (1971)</u>
	kesonurbo	<u>Leksara kolekto... (noto4)</u>
<u>Quito</u>	Kvito	<u>Poŝatlaso de la Mondo</u>
	Kito	G.Waringhien (1976); PIV

La regulo estas esprimebla per la sekvaj du formuloj.

- vaquero:vakero = quetzal: kecalo.
- Don Quijote: Donkiĥoto = Quito: Kito.

Sekve, hispanaj que kaj qui devas esti asimilitaj en Esperanto kiel "ke" kaj "ki" respektive. Ankoraŭ du apogantaj ekzemploj estas: quebracho: kebraĉo kaj Quechua: keĉuo, ambaŭ registritaj en PIV.

Regulo 2: Fonetisma transskribado de z en certaj vortoj estu per "s"

La fonemo /z/ ne ekzistas en la hispana normlingvo. Ĝi aŭdiĝas nur, kiam s/s/ staras antaŭ voĉa konsonanto: mismo (elp.mizmo). La z en la kastilia lingvo de Hispanio estas senvoĉa frikativa interdental fonemo / ~~z~~ /. En la suda Hispanio kaj en la tuta Hispanameriko, alia fonemo, /s/, anstataŭas /~~z~~/, sed la ortografio ne ŝanĝiĝas (Vd. §6.3.6 en la studaĵo referencita en noto 1). Sekve, por asimili hispandevenajn nomojn kaj vortojn oni povas elekti aŭ grafisman solvon per "z" aŭ fonetisman solvon per "s". En la vorto quetzal la literduopo tz aŭdiĝas kiel "ts" aŭ, laŭ la Esperanta

ortografio, kiel "c".

Apogas tiun procedon la sekvaj vortoj kaj nomoj, plejparte fonetisme asimilitaj.

<u>Hispanaj etimoj</u>	<u>Esperantigoj</u>	
<u>zapote</u>	sapoto	PIV
<u>Guipuzcoa</u>	Gipusko	U.J. Moritz (1971)
<u>Sancho Panza</u>	Sanĉo Panso	E. Miĥalski
<u>Zarzaparilla</u>	sarsaparillo	Léger kaj Albault (1961)
	sarsapario	G.Waringhien (1957).
<u>Zaragoza</u>	Zaragoza	PIV
	Saragoso	Joseph Rhodes (1908); G.Waringhien (1957).
<u>Velázquez</u>	Velaskezo	Pulcher kaj Long (1963). RIM.
1		"S" kaj "z" estas uzataj en la sama nomo!
	Velasko	<u>Leksara kolekto...</u> (noto4). RIM. En tiu ĉi verko estas "Zaragoso" kun "z" kaj "s"!

Konkludo

La ĉi-supraj ekzemploj kaj rezonado evidentiĝas, ke la sola ĝusta formo de quetzal en Esperanto estas "keĉalo". Pro tio, la Direktoro de la Sekcio pri Ĝenerala Vortaro rekomendas, ke en reviziita eldono de PIV, la erara formo "kvezalo" estu forigita.

Apendico: apliko de la reguloj al aliaj latinidaj lingvoj.

La samaj principoj estas facile aplikeblaj al vortoj kaj nomoj en aliaj latinidaj lingvoj kun la silaboj que kaj qui, kies prononco estas "ke" kaj "ki" respektive.

Francaj etimoj Esperantigoj

<u>Québec</u>	Kebeko	PIV
<u>maquis</u>	makiso	PIV

RIM. Esperantigado en Leksara kolekto...(4) estas nekonsekvencia.

Apud "Québec/Kebeko" kaj "Quimper/Kimpero" estas la deviaj formoj "Saint-Quentin/Sankvento" kaj "Aquitaine/Akvitujo" kun la altruda "v."

Portugalaj etimoj Esperantigoj

<u>Alenquer</u>	Alenkero	Pereira de Souza (5)
<u>Quixada</u>	Kiŝadao	Pereira de Souza

.../...

Notoj

1. Bernard GOLDEN. Superrigardo de neologismoj: la kazo de "sgrafito". La letero de l' Akademio de Esperanto. 1989 januaro-marto; 6: 5-7.
2. Bertilo WENNERGREN. La U-hoko. Literatura Foiro. 1989 aprilo; 118: 8-12.
3. Bernard GOLDEN. Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj. Pĝ. 235-257 en: Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo. Vol. II: esperantismo. La Laguna: Universidad de La Laguna; 1987 790pĝ.
4. Rikardo [^]SULCO kaj Hermano BERMANO (=Richard Schulz kaj Hermann Behrmann). Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj. Paderborn: Esperanto-Centro; 1989. 141 pĝ.
5. Délio PEREIRA DE SOUZA. Brazilaj geografiaj nomoj. Brasilia: Laborgrupo "Antaŭen"; 1981. 72pĝ.

BONDEZIROJ DE LA REDAKCIO

Spite al la militaj minacoj ĉe la nuna jarfino la redakcio prezentas al la legataro siajn bondezirojn por la nova jaro 1991: sanon kaj prosperon, kaj sukceson en la disvastiĝado de Esperanto.

"Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan".

(La Vojo).

Nur la asocio "LA AMIKOJ DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO" ebligas interalie eldoni la publikigaĵon "LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO".

Jara aliĝo al la AMIKOJ: 100 FRF

Jara abono al la LETERO: 120 FRF

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

" Ne gravas, se foje vi ne konsentas... La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj! La sola problemo estas konscii pri tia neceso kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj! "

D.- Ankoraŭ pri -ino. " Se mi legas la eraran frazon "S-ino X estas prezidanto", mi pensas, ke la eraro okazis ĉe la vorto "S-ino". Mi do komprenas la frazon, kiel "S-ro X estas prezidanto". Nu, se pro la influo de la angla lingvo (ĥi! Esperanto ne devus imitaĉi la sensencaĵojn de naciaj lingvoj) la frazo " S-ino X estas prezidanto estas ĝusta kaj signifas "S-ino X estas prezidantino", en tiu okazo mi demandas, ĉu la Akademio ankaŭ sankcias, kiel ĝustajn, la samstrukturajn frazojn "S-ino X estas mia kuzo", aŭ "S-ino X estas mia frato". (A.F.põntinha).

R.- Viaj rimarkoj kaj demando plentrafe ilustras, kiel malbona estas tia nuna uzateco, kiu sub influo de miskomprenita feminismo instigas atenci la gramatikon kaj la lingvan tradicion.

La Akademio memorigas la FUNDAMENTON:

Mia fratino estas tre bela knabino. §33

Mi havas diversajn servantojn:kuiriston, ĉambristinon, infanist-
inon kaj veturigiston. §37.

Solecismo restas solecismo, eĉ se farita pro snobeco pri la angla lingvo kaj deziro aspektigi virajn profesiojn de virinoj! (J.T.)

D.- Akuzativigo de citaĵoj. La kreinto de Esperanto ĉiam akuzativigis citaĵojn. Tion ĉiu esperantisto povas facile konfirmi privilegante Zamenhofon. Spite de tio la esperantaj gazetoj nuntempe plejparte ne akuzativigis citaĵojn. Mia demando estas:" ĉu ekzistas ia motivo, kial la esperantistaro ne sekvas la uzadon de Zamenhof ĉi-rilate. Aŭ tio estas nescio, neglekto aŭ simple indiferenteco?
(J/Smith, Burnaby Kan.)

R.- Kiel trafe rimarkigas la PLENA ANALIZA GRAMATIKO," citaĵo povas konsisti el unu vorto, el pluraj vortoj, el unu frazo, el pluraj frazoj." Jam oni aldiru,ke, se vorto aŭ vortoj estas akuzativigeb-laj, estas malfacile akuzativigi tutan frazon kaj des pli tutajn frazojn!. Verfakte, kion akuzativigas D-roL.L.Zamenhof, tio estas ne la citaĵo mem, sed la anoncvorto, kiu antaŭas ĝin:

neniam uzu la vorton "amo" z
tiam uzu la pronomon: oni z
ke ni elĵetu la vorton kaj z
mi sendis al vi hodiaŭ du manuskriptojn ("Universal Vortaro kaj "Ekzercaro").

Eĉ la anoncvorto estas foje subkomprenebla:

la germana Haus signifas esperante (ĉi tion):domo z
Unuvorte citaĵo ne alprenas akuzativon, sed estas anoncita aŭ per anoncvorto kun -n aŭ per signoj: citiloj,dupunkto, krampoj aŭ kursivoj. (J.T.)

"LA LETERO DE L'AKADEMIO", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l'Akademio de esperanto",5,rue Léon Cogniet F- 75017 PARIS - Francio.- Redaktoro: Jean THIERRY.- Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX.- Presejo:Coconnier, 72300 SABLE. C.P.P.P. n-ro 69710 1 n-ro: 40FRF. Jara abono:120 FRF Pagebla ĉe kontoj: Banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris UEA:Poŝta Banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag): recizigi "por la Amikoj de l'Akademio de Esperanto".

Peranto por Svedio: Sveda Esperanta Federacio- c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl.455- S 242 94 HÖrby. Svedio
Peranto por Brazilo: Brazila Esperanto-Ligo - ScS Ed Jockey Club-Sala 103 70300 Brasilia DF(caixa Posta 11 11 05)- Brazilo.

Peranto por Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-redakcio de Radio Havano)) Longa 220,apt 5,Mantilla, 13800 LA HABANA- Cuba

Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur.3493 villa Ilimpica edif.27-001 14020 Tlalpan México DF Meksiko.

Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio.